ADORU 116



3. Ke niaj sentoj viglas nun ankoraŭ;
   ke niajn membrojn trovas ni uzeblaj;
   tion ni havas dank' al Lia beno.
   Laŭdu la Estron!

4. Ho Gardeganto, kiu riĉe donas,
   lasu vi plue super nia vivo
   ŝvebi la benon. Levos ni la voĉojn:
   Laŭdu la Estron!

5. Lasu hodiaŭ nin per Via gvido
   sur niaj vojoj ne senhelpe iri,
   kaj ĉie ajn en Via graco stari.
   Laŭdu la Estron!

LOBET DEN HERREN ALLE, DIE IHN EHREN • EG 447 • GL 671 • RG 570 • KG 674 • EM 607 • LH 7 • M (Lobet den Herren): Johann Crüger 1653 • germana T: Paul Gerhardt 1653 • E: Paul Gottfried Christaller, W. J. Downes, 1971 en AK 224 [K409T] • ↑ Psa 25,10; 104,33